

## RAPORTO PRI LA AGADO DE EEU EN 2005

Eŭropa Esperanto-Unio startis en nova organiza kaj labora formo en 2005. Ĝis aprilo 2005 ankoraŭ funkciis Brusela Komunika Centro en kiu laboris profesie Marko Naoki Lins. Ekde la unua de majo BKC ne plu funkciis. EEU elektis novan direktoron Ben Indestege, sed li neniam praktike ekfunkciis, tiel ke fine de la jaro la estraro decidis havi nur duonprofesian laboron kadre de EEU kiun plenumos du personoj: Petro Balaž, kiu zorgos pri interretaj aktivadoj kaj medioj kaj Vesna Obradović, kiu redaktas la Eŭropan Bultenon, zorgas pri preparoj de la EEU-kongreso kaj pri projektoj sendataj al eksteraj fondusoj por financado.

Ĝis julio aperis Eŭropa Bulteno kaj en elektronika formo kaj en papera kiel aldonaĵo al La Ondo de Esperanto. Poste aperis ĉiumonate nur elektronika formo legebla ĉe [www.lingvo.org/bulteno](http://www.lingvo.org/bulteno).

En majo 2005 estis fine oficiale registrita EEU kun sidejo en Bruselo kaj ekde tiam EEU havas juran personecon kaj sian bankkonton. Financan laboron prizorgis Flory Witdoeckt.

La estraro de EEU havis unu kunsidon aprile en Kolonjo kaj unu en Vilno julie. La Asembleo de EEU kunvenis la unuan fojon en nova konsisto (20 reprezentantoj de 20 EU-landoj) en Vilno (Litovio) la 26-an de julio. Dum la kunveno, kiu estis malfermita ankaŭ por aliaj esperantistoj oni povis aŭdi raporton pri la jaro 2004/2005, oni akceptis laborplanon por 2005/2006 kaj elektis novan estraron je 3-jara mandato: d-ro Seán Ó Riain (IRL) - prezidanto, Zlatko Tišljar (Slovenio) - sekreatrio, Flory Witdoeckt (BE) - vicprezidanto kaj kasisto, Petro Baláž (Slovakio) - membro kaj Georgo Handzlik (Pollando) - membro.

AL EEU aliĝis novaj landaj asocioj el pluraj novaj EU-landoj: Malto, Hungario, Ĉeĥio, Pollando, Slovenio, Slovakio. En Kipro ne ekzistas esperanto-asocioj. Baltaj landoj (Litovio, Latvio kaj Estonio) ne aliĝis ankoraŭ. (Latvio kaj Litovio aliĝis en unua duono de 2006)

EEU vigle aktivis per ret-forumoj Eŭropo, EEU-kaj-Landaj-asocioj, EEU-ĝenerala-sembleo kadre de kiuj oni intershanĝis ideojn pri novaj planoj kaj celoj. EEU regule kompletigadis UEA-retpaĝojn rilatajn al eŭropaj demandoj, kion teknike prizorgis Aaron Irvine kaj agis por ricevi propran retadreson.

EEU helpis al Margareta Handzlik disdoni inviton al ĉiuj EU-parlamentanoj por NITOBESimpozio en Vilno (ĉiu parlamentano ricevis inviton en sia nacia lingvo) kio havis tre pozitivan reagon. Pluraj parlamentanoj dankis la inviton.

Dum la unuaj 4 monatoj okazis regula sekvado de gazetaro, reagkomapnjoj kaj sekvado de diskriminaciaj dunganoncoj, kiuj estis regule aldonataj al la listo en [www.lingvo.org](http://www.lingvo.org). Ankaŭ aperis pluraj artikoloj pri la agado de EEU en Esperanto-revuo de UEA.

La tuta estraro de EEU (krom Petro) partoprenis ankaŭ en la laboro de NITOBESimpozio en Vilno kaj la prezidanto partoprenis en Pariza konferenco pri minoritataj lingvoj, kie li prezentis reehan referaĵon. Margareta Handzlik iniciatis kunvenon kun la EU-komisionano Jan Figel kaj proponis aktivecon kiu ebligus realigi la tiel nomatajn hungarajn rajtojn ankaŭ en aliaj EU-landoj. En Maribor komenciĝis preparoj por la 7-a EEU-kongreso.

Kunlaboro inter EEU-estraro kaj landaj asocioj ne estis tre elstara, tamen kontentiga. Ĉiuj malnovaj Landaj Asocioj krom Svedio kaj Grekio pagis la kotizon kaj certgrade kunlaboris. Tamen plej laŭdinda estis kunlaboro kun Francio kaj Danlando.

Pliajn detalojn pri la agadoj kaj iniciatoj oni povas legi en la monataj bultenoj de la jaro 2005.

Zlatko Tišljar